

Nomaro de svedaj birdoj, sveda, latina, esperanta far Birger Gerdman, *Stockholm 1953; eldonajo de S. Alexandersson. 16 paĝoj 21 × 15 cm², 0.60 sv. kr.*

Tiu ĉi eldonajo sub aŭspicio de la sveda sekcio de ISAE kaj la teknika sekcio de Sv. Esp. Federacio estas bazita sur la 5-lingva nomaro, eldonita en 1950 okaze de la 10a internacia ornitologia kongreso en Upsala. La aranĝo estas alfabetata laŭ la svedaj birdonomoj. Per la sistema 5-lingva nomaro nesvedoj povas facile trovi ĉiajn deziratajn nomojn.

Trarigardante la liston oni povas konstati ke la kompilinto klopodis eviti nenecesajn neologismojn; li prave preferas tradukitan nomon, ĉu el la latina, el la sveda aŭ eble el alia lingvo. Li transprenis la nomojn, kiuj jam troviĝas en Plena Vortaro, eĉ kiam tiuj prezentas nenecesajn neologismojn.

La nomoj prezentitaj ofte diferencas de tiuj, kiujn mi en 1948 publikigis en *La Progresanto*, sed ofte ili akordas. Oni povas demandi ĉu estas saĝe elpensii novajn pli bonajn nomojn; la pli bona ja estas la malamiko de la bona. Tion farante oni riskas kaŭzi malstabilecon kaj haoson. Tamen mi devas konfesi ke kelkaj ŝanĝoj estas plibonigoj pro koncizeco aŭ karakterizo. Aliaj ŝanĝoj ŝajnas al mi ne motivitaj ekz. *sovaĝanaso* (Gerdman) anstataŭ *plumbekanaso* (Mackink). Mi ne komprenas kial Gerdman ŝanĝis la nomon *griza turdo* (Støp-Bowitz) al *sorpa turdo* (*Turdus pilaris*). La nomo *lagopa buteo* anstataŭ mia *vilkurra buteo* ŝajnas al mi nedezirinda, ĉar ĝi enhavas derivitan adjektivon de la neologisma nomo de la *lagopo* (*Lagopus*, genro de kokecaj birdoj, kies nomo signifas vilkrurulo). Traduki la latinan nomon *Sterna sandvicensis* per *sandviĉa ŝterno* ŝanĝas geografian adjektivon en adjektivon kiu povus esti komprenata kiel nomo de nutraĵo.

Gerdman anstataŭigis la nomon *verdkrura tringo* (Stojan) por *Tringa ochropus* per *grizkrura tringo*. Li uzas la nomon *verdkrura tringo* por *Tringa glareola*, tradukinte la svedan nomon. Tia ŝanĝo rekte povas kaŭzi konfuzon.

Pri multaj nomoj oni longe povas disputi, ĉar pliaj ebloj estas motiveblaj kaj egale bonaj kaj ofte fine la persona gusto decidas. Ĉu diri *granda* aŭ *turda akrocefalo*, ĉu *rulĉirpa* aŭ *babilema silvio*, ĉu *punktita* aŭ *makulita porzano* ktp. tute ne estas grave. La ĉefa punkto estas ke la birdo havu ekskluzivan nomon, kiun ĉiu povas uzi sen dubi inter alternativoj. Nomo ja esence ne estas priskribilo sed indikilo. Malbona nomo bone povas funkcii kiel indikilo; alternativo de pliaj bonaj priskribaj nomoj endanĝerigas la veran funkciadon de nomado. Proponantoj de novaj nomoj sin devigu al plej severa respektado de ekzistantaj nomoj eĉ se tiuj ne estus ĉiurilate kontentigaj.

G. F. M.

Elektroteknika Terminaro, Esperanta - sveda, kompilita de Sven Alexandersson.

Tiu ĉi terminaro estas la dua en serio de teknikaj terminaroj, eldonataj de la Teknika Sekcio de la Sveda Esperanto-Federacio kaj la Sveda Sekcio de ISAE. Kvankam ankoraŭ modesta en sia formo ĝi reprezentas tre imitindan ekzemplon de la iniciato de kompetentaj fortoj, kiuj volas kunlabori por havigi al ni kompletajn teknikajn terminarojn.

Sur 18 paĝoj (kial ne numeritaj?) la broŝuro donas la plej gravajn vortojn, uzatajn en elektrotekniko, telekomunikado kaj radiotekniko kun la tradukoj en sveda lingvo. Kvankam la uzado ŝajnas limigita al la konantoj de la sveda lingvo, ĝi tamen havas pli vastan aplikon, ĉar la Esperantaj terminoj estas facile kompreneblaj kaj tradukeblaj por ĉiu fakulo, kiu trovas en la libreto kompilon de la ĉefaj vortoj kaj terminoj de sia fako. Oni nur povas deziri, ke la listo, kiu havas nur tre modestan amplekson, estu plivastigata kun multaj terminoj uzataj en la apartaj branĉoj de la elektrotekniko, ekz. la elektraj maŝinoj, la distribuo de la elektro kaj multaj aplikoj.

La uzataj formoj ne donas motivojn por multe da kritiko. En kelkaj okazoj la donitaj formoj estas diferencaj de la formoj, uzitaj en la Internacia Elektroteknika Vortaro de la IEC, kiuj cetere estas aldonitaj inter krampoj. Oni ŝatus scii, kiuj estis la motivoj por tiu deviado de formoj, kiuj kvazaŭ jam havas ian oficialecon. Ankaŭ trafis min la vorto „elektrejo” por „ejo, kie elektra energio estas kreata”. Laŭ la logiko ŝajnas, ke tiu ideo ne estas esprimata per la simpla kunmeto de la radiko „elektr” kaj la sufikso „ejo”. Oni uzis por tiu ideo la esprimon „elektra centralo” kaj mi opinias, ke tiu formo jam estas internacie komprenebla.

Cetere la libreto meritas nian laŭdon kaj ni volonte atendas aliajn terminarojn en la sama kolekto kaj poste la eldonon de pli ampleksaj listoj de fakaj esprimoj.

Ir J. R. G. Isbrücker.

914.81

Faktoj pri Norvegujo far J. B. Hegna, R. Wold kaj F. Magnus, tradukis H. A. Rosbach. *Chr. Schibsted-eldonejo Oslo 1953. 64 paĝoj, 12,5 × 17 cm²; multaj figuroj, precipe fotoj.*

En 1948 *Centra Dana Esperantista Ligo* iniciatis la valoran eldonadon „Faktoj pri Danlando”. La ĵurnalo „*Aftenposten*” en Oslo sekvis en 1953 per simila libreto pri *Norvegujo*. Mi esperas ke multaj aliaj landoj sekvos. La verketo bone taŭgas por doni ĝustan kaj koncizan informon. Malgraŭ sia koncizeco la teksto estas agrable legebla, ĉar la aŭtoroj ne nur donis faktojn sed ankaŭ komprenon pri la evoluo de la norvega socio. Vojaĝontoj povas trovi en ĝi scierojn, valorajn ĉe eventuala vizito. La lingvaĵo estas bona, preseraroj preskaŭ mankas. La ilustraĵoj estas klaraj, la papero bona.

Kelkaj el la uzitaj terminoj ŝajnas al mi superflujaj do evitendaj ekz. *sanitara sistemo*, anstataŭigenda per *higiena, saniga* aŭ *poršana sistemo*; *sociaj aranĝoj* anst. per *sociaj aranĝoj*; *unio* anst. per *unuigo*; *agraroj* anst. per *kamparanoj*; *ministerio* anst. per *ministrejo*; *anti-aeroplana artilerio* anst. per *kon-*